



SVISA

ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

5/91

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/53 77 13

Septembro-Oktobro

LA KONTAKTO KUN LA GRUPOJ

Nova klopodo postulas ankaŭ sian tempon! Depost la eldono de la novstila "SVISA ESPERANTO-societo informas" mi skizis la efektivan intencan. Kiel la leganto povas konstati, la listo de "GRUPAJ INFORMOJ" iom post iom kompletiĝas. Mi esperas, ke baldaŭ ĉiu grupo al kutimiĝos kaj disponigos la necesajn indikojn. Tiel la fiksitaj celoj alproksimiĝos. Sed - - mi ne volas paroli nur pri grupoj. Same gravaj estas ĉiuj izolaj Esperantistoj. Ilin forgesi oni ne rajtas. Plia kategorio estas personoj, kiuj iam eklernis kaj parolis la lingvon, sed, eble pro manko de grupo proksima, nenie aliĝis. Al ili mi aparte apelacias. Estas eĉ multaj tiaj gesamideanoj. Per alvoko mi volas interesigi ilin pri nia Svisa Movado kaj instigi ilin al ekago kaj kunhelpo en niaj klopodoj. Leginte tiujn-ĉi liniojn certe unu aŭ la alia rededidiĝos fariĝi aktiva membro. Nur forta kaj multnombra movado estas konsiderinda. Ni konsciu, ke "UNUECO ESTAS FORTO".

-FL-

* * *

DANKON AL LA GRUPOJ

La prelegvojaĝo de d-ro Krause jam apartenas al la pasinteco. Pro la amikeca akcepto kaj gastigado de la preleginto kaj lia edzino kaj pro la bonaj lokaj aranĝoj en la koncernaj grupoj, mi ŝatas tutkore danki. Estas signo de vera kunlaborado.

Ĝojige estas ankaŭ aŭdi la tre pozitivajn vortojn pri la interesaj prelegoj.

-FL-

* * *

KORAN GRATULON

Bedaŭrinde iom tro malfrue, sed ne malpli koraĵ estas niaj bondeziroj. La 30-an de junio 1991 nia kara Paul Bächli en Ennetbaden festis sian 90-an naskiĝtagon.

"KARA PAUL" BONVOLU AKCEPTI LA PLEJ SINCERAJN BONDEZIROJN OKAZE DE TIU RIMARKINDA TAGO. NI DEZIRAS AL VI ĈION BONAN, PRECIPE, KE VI POVU ĜUI VIAN BONAN SANECON EN LA ESTONTECO".

Paul Bächli estis tre aktiva Esperantisto kaj por nia movado kompetenta kaj ĉiam afabla samideano.

Ni volonte rememoras ankaŭ lian agadon en la Eŭropaj Ferio-Semajnoj (EFS), organizitaj de la Svisaj Esperantistaj Fervojistoj (SAEF). En la jaroj 1971 ĝis 1977 li regule kunlaboris, gvidante kurson por komencantoj. Pri la rezulto li povas esti fiera ankoraŭ hodiaŭ. Ĉiujare li fondis kanthoron, kiu plibeligis je ĉiu okazo la tutan etoson en la multnombra partoprenantaro. Nelaste estu menciita la de li fondita ĥoreto "ESPERANTO-SINGERS". Iliaj prezentaĵoj estis ĉiam aparta plezuro. Ni deziras al Paul Bächli, ke li ankoraŭ longe povu ĝui pri tiuj belaj rememoroj.

* * *

-FL-

DONACOJ

En la unua duono de la kuranta jaro 1991 SES ricevis financon subtenon de:

Paula Schaufelberger Zürich 100.- , L.Dovat Rensens 40.- , L.Dahan Genève 50.- , T.Gamper Winterthur 20.-, L.Schaerrer Langenthal 50.-, anonima donaco 30.-, Dora Hemmann Bern 5.-, R.van Puijenbrock Winterthur 10.-, Dieter Rooke Oensingen 50.-, W.Gasser Schaan 50.-, D.Bühlmann Lausanne 50.-, J.Tomaszczyk Avanchet-Parc 15.-, P.Ruchti Rümlang 10.-, W.Laederach Zürich 20.-, G.Gacond Neuchâtel 6.- .

La Svisa Esperanto-Societo tutkore dankas por tiuj valoraj kontribuoj.

-EvM-

* * *

GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BASEL:

25.9.20.00h Monata kunveno en restoracio Mägd.
S-ro Claude Gacond prelegos pri: **PLIINTIMIGO AL
LA MONTARO JURASO**, kun lumbildoj.

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

En restoracio **AL FORNO** Spitalgasse 37.

2.9.19.30h kaj 30.9.19.30h
7.10.19.30h kaj 28.10.19.30h

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

5.9. Ŝipa rondveturado sur la kvarkantona
lago. Informojn donas Sonja Brun.

26.9.20.15h En restoracio **SIMPLON** Habsburger-
strasse 16.

Muzikinstrumentoj: Tekniko kaj funk-
cio (ekzemple akordiono kaj fluto).
Parolos Paŭlo Scherer.

17.10.20.15h En restoracio **SIMPLON**.

Personaj impresoj pri la 76-a Univer-
sala Kongreso de Esperanto en Bergen/
Norvegujo. Parolos diversaj Kongresanoj.

ESPERANTO-KLUBO WIL:

En restoracio **SCHWEIZERHOF** Unt.Bahnhofstrasse 18.

11.9.20.00h Prelego pri la 76-a Universala Kon-
greso de Esperanto en Bergen. Lumbildoj.

2.10. Laŭ interkonsento kun s-ino Gertrud
Eggenberger.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

9.9.14.00h Libera kunveno: Renkontiĝo en resto-
racio **RIGIBLICK**.

14.10.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse.

1. Lumbildprelego pri vojaĝo en Polujo.
Parolos s-ro Dieter Rooke.

2. Se eblos: 2-a parto de prelego de la
prezidanto, pri:

ESPERANTO EN MIA VIVO.

LA ESPERANTISTAJ GESTUDANTOJ ZURIKO, ekde la ve-
nonta semestro, renkontiĝos en la hejmo de Diet-
rich Weidmann Florastr.17 8008 Zürich regule mar-
de je 19.00h. Dum semestraj ferioj ni ne kunvenas.

ESPERANTO-JUNULARO ZUERICH renkontiĝos ek de nun
regule la lastan lundon monate en la junulardomo
de la urbo Zuriko (Dynamo/Drahtschmidli) je 19.00h.

RENKONTIĜO EN WINTERTHUR

Dank' al la invito de la Esperantoklubo Wil, Esperantoklubo Winterthur kaj SAEF, sub la gvidado^{de}s-ino Gertrud Eggenberger, pli ol 20 geesperantistoj ĝuis memorindan tagon, je la 22-a de junio 1991, vizitante la TECHNORAMA en Winterthur.

Post kora bonvenigo per la reprezentantoj de la organizaj grupoj, oficiala gvidanto, kun la helpo de fakuloj el la diversaj sekcioj de la ekspozicio, klarigis al ni - ofte per speciala ekfunkciigo de la koncernaj maŝinoj - ĉiujn aspektojn de tiu multflanka reprezentado de teknika evoluo. La vapormaŝinoj, dizelaj motoroj, la pendanta ponto, diversaj teks- kaj ŝpinmaŝinoj kaj la agrablaj sonoj de la muzikaŭtomatoj estas nur kelkaj el la ekspoziciaĵoj, kiuj multe interesis nin.

La tagmanĝo donis okazon por amikeca babilado, kaj plej amuzaj estis la rezultoj de la sprita konkurseto, kiun s-ro Glättli iniciatis dum la antaŭa kaftrinkado. Li estis tre milda juĝisto, ĉar finfine ĉiu partoprenanto estis regalita per dolĉaĵoj en la formo de ĉokolado kaj kiso de la ĉarma premio-distribuantino!

Laŭtlegado de tradukita teksto el la libreto "Die Stadt am Nabel der Welt" (La urbo ĉe la umbiliko de la mondo), donis al ni kelkajn impresojn pri la progresema urbo Winterthur dum la dudekaj jaroj.

Nur tro rapide preterpasis la libera posttagmezo kun refoja vizito de la ekspozicio kaj ĉirkaŭaĵo, aĉetado de memoraĵoj, skribado de salutkartoj kaj kunestado.

Koran dankon al la grupoj de orienta Svisio kaj speciale al sinjorino Eggenberger, kies lerta organizado kaj gaja entuziasmo ebligis al ni pasigi memorindan tagon en Winterthur kaj ties fama TECHNORAMA!

La partoprenintoj de la Lucerna Esperanto-Societo.

* * *

NIA PRELEGVOJAĜO TRA SVISLANDO

Invitite de Svisa Esperanto-Societo mi povis, kune kun mia edzino, fari dusemajnan prelegvojaĝon tra Svislando. Inter la 29-a de majo kaj la 10-a de junio 1991 okazis sep prelegoj en Esperanto pri la temo "Plurjara restado en sudorienta Azio" kun montrado de ĉirkaŭ 150 diapozitivoj, ĉefe pri Hindio, Birmo kaj Indonezio.

En la Esperantoklubo de Wil [29.5.], Basel [30.5.], Neuchâtel [31.5.], Vevey [2.6.], Luzern [4.6.], Bellinzona [6.6.] kaj Zŭrich [10.6.] ni estis afable akceptitaj kaj ĉie la etoso estis tre amika. La gastamo, aparte de la gesamideanoj, kiuj tranoktigis nin, estis modela kaj ni volas, ankaŭ ĉi-linie, elkore danki al ili. Antaŭ ĉio ni dankas al la organizinto, nia longjara amiko Fritz Liechti en Zŭrich, kaj s-ron Claude Gacond en KCE La Chaux-de-Fonds, pro la multfaceta prepara laboro por ĉi tiu prelegvojaĝo.

Ili, sed ne nur ili, zorgis ankaŭ pri ioma turisma oferto, tiel ke ni povis vidi la imponan Svisan Ĵurason, la lagojn de Ĝenevo kaj Lugano. Apartan dankon ankaŭ pro tio.

La 3-an de junio mi estis intervjuita en la studio de Svisa Radio Internacia en Bern pri mia restado en Svislando, pri miaj fakaj laboroj sur la kampo de leksikologio [koncerne Esperanton kaj la indonezian lingvon, kaj mi esperas, ke pere de tiuj ĉi intervjujparoladoj mi povos -- en la etero -- rekontakti ĉiujn niajn novajn geamikojn en la Svislanda Esperanto-movado.

Mi kaj mia edzino fartis tre bone inter vi kaj ni deziras al vi ĉiuj sanon kaj por Esperanto en via belega lando ni deziras progreson.

Amike salutas:

Erich-Dieter Krause kaj edzino.

D-ro Erich-Dieter Krause

Membro de la Akademio de Esperanto

Leipzig/Germanio.

* * *

KIEL LERNI ESPERANTON ? (II)

Tuj de la jarcentkomenco ni provis rapide lerni la novan lingvon de Zamenhof kaj serĉis pruvi, ke ĝi al la nia tre similas. Tamen, ni ne sufiĉe komprenis, ke tia sistemo ne necesas komplikiĝi pere de niaj gramatikoj.

Zamenhof, genie, kaptis radikojn el niaj eŭropaj vortaroj, sed ne plu implikis sin pri komplikajtoj.

Per sia "FUNDAMENTO DE ESPERANTO", Zamenhof bone klarigas kiamaniere studi. Dum la tri unuaj tagoj la lernanto studas la literojn de la alfabeto kaj la legadon kun precizeco kaj ritmo. Li ne ankoraŭ ĉion komprenas, sed bone povas legi.

Sekve, Zamenhof elektis sep literojn por fini la radikojn; li aldonis kvindekon da silaboj por precizigi multajn malsimilajn uzojn, kaj kvindekon da vortetoj kiel pronomoj kaj prefiksoj, kuniĝoj, kaj silabojn por la verbaj tempoj.

Per la "ĉkzercaro" de la fundamento, Zamenhof ĉiu-foje donas liston de la novaĵoj kaj skribas unu frazon por uzi ĉiun el ili. Ni agu tiel: unue, serioze, ni lernu tiujn elementojn, kies senco aperas laŭ kvin tradukoj: franca, angla, germana, rusa, pola. Tiam, ni komprenos la tekston donitan.

Sed tuj ni devas ankaŭ provi uzi tiujn novajn silabojn kun la aliaj radikoj jam lernitaj. Ni parolu kun ni mem, faras demandojn kaj respondojn por asimili ĉiun novaĵon.

Iom post iom, ni povas aldoni la legadon de Esperanta gazeto aŭ libro, alpreni novajn radikojn, kaj kutimiĝi al observado de la farmaniero de aŭtoroj per la vortelementoj. Kiel infano ludas per ŝtonetoj por konstrui ponton aŭ tunelon, ni faru same por paroli per niaj jam akiritaj rimedoj.

-R.W. Perrenoud-

* * *

KAMPADO 91

De la 9-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1991 okazis en Oetwil a.L. apud Zŭrich kun granda sukceso la Kampado 91. Partoprenis entute 40 homoj (Esperantistoj kaj ne-jam Esperantistoj) el Ĉilio, Germanio, Israelo kaj Svislando inter la aĝo de 13 monatoj kaj 84 jaroj. La etoso estis amika, amuza kaj ĝoja. Ni festadis kaj tamburadis ĝis frumatene kaj memkompreneble nur malmulte dormis. Dimanĉe la 11-an de aŭgusto okazis, post longa tempo, la unua ordinara asembleo de Junularo Esperantista Svislanda, dum kiu ni elektis plene novan kaj tute junan estraron: Prezidantino Marion Grosjean; vicprezidanto: Toni Chabrier; kasisto: Mario L pine.

* * *

-D.WDM-

DAGESTANA ESPERANTO-CENTRO INVITAS

Dagestano! Per aeroplano, trajno, buso kaj piede rapidas la homoj al tiu-ĉi ekzotika Anguleto de Kaŭkazio al renkonto kun rava beleco, naturo, antikvaj monumentoj kaj modernaj urboj. Dagestano estas hela kaj bunta mondo, plena de mirindaj kontrastoj, unikaj pejzaĝoj, raraj bestoj kaj plantoj. El kvar tagoj ĉi-tie tri estas sunaj. La panoramo de kaŭkaziaj montoj, neĝaj pintoj, verdaj valoj, orsabla bordo de la kaspia maro kaj abunda suno allogas turistojn al ripozo kaj vojaĝado.

La respubliko "DAGESTANO" estas ne nur lando de montoj, sed ankaŭ lando de lingvoj. Pli ol 30 radikaj nacioj unuigitaj per ideo de frateco kaj amikeco loĝas ĉi-tie. Jam 3000 jarojn antaŭ nia epoko loĝis ĉi-tie antikvaj triboj. Ĝi estas riĉa pro tri trezojoj: Tero, akvo kaj homoj kun siaj majstreco kaj povo.

En Dagestano estas bone ripozi kaj vojaĝi en ĉiu sezono de la jaro. Ŝtataj estas la monta kaj akva turismoj, neripetebaj pejzaĝoj, adorantoj de popola belarto.

Plej postulema homo povas trovi la itineron de vojaĝo konforme al siaj aĝo kaj sano, inklinoj kaj intereso.

Ekzemple tendaro Esperantista (ITEM 91) okazos de la 7-a ĝis la 17-a de septembro 1991.

Esperanto estas praktikebla de frumateno ĝis noktomezo.

Esperanto-Centro Abon. Jaŝĉik 11 SU 367013 Maĥackala.

* * *

|| Redaktfino de la venonta SI estas la 14.10.91. ||

KOTIZO 1991, ALVOKO DE LA KASISTO

Kontrolo montris, ke pluraj SES-membroj bedaŭrinde ankoraŭ ne pagis sian SES-kotizon 1991. Ni permesas al ni, almeti por tiuj koncernan enpagilon.

MEMBRO-KOTIZOJ (inkl. abonon al LF kaj SI):

- infanoj k. geknaboj ĝis 18 jaroj	SFr. 5.-
- junuloj ĝis 26 jaroj	30.-
- emeritoj, pensiuloj	30.-
- geedzoj emeritaj	45.-
- ceteraj membroj	50.-
- geedzoj	75.-
- abonantoj sen membreco	30.-

Por via tuja pago ni tre dankas.

Limdato: 31-a de oktobro 1991.

Elkoran dankon al ĉiuj, kiuj jam pagis!

Via kasisto: E. von May

* * *

ESPERANTO KIEL PONTLINGVO DUM RENKONTIĜO DE GELERNANTOJ EL WIL KUN DU JUNAJ HUNGARINDJ.

En junio 1991 ni gastigis ĉe ni, dum kelkaj tagoj, du junajn hungarajn knabinojn (Nora 17, Palma 15), kiuj vojaĝis tra Svislando, Francio kaj Germanio. Dum la restado en Wil mi organizis renkontiĝon kun gelernantoj de mia klaso. Dum unu horo Nora kaj Palma respondis je pluraj demandoj starigitaj de la gelernantoj. La demandoj estis diversaj. La gelernantoj forte interesiĝis pri Hungario mem kaj la vivo de Hungaroj, pri hungara lernejo kaj ties sistemo, kion faras hungaraj gejunuloj dum libera tempo. Dum la rakontado ni rimarkis multajn diferencojn en la vivo de hungaraj kaj svisaj gejunuloj, kiuj estis ofte tre amuzaj kaj interesaj. Ĉar la gelernantoj en Wil ne konas Esperanton, tial do Esperanto servis kiel pontlingvo. Mi tradukis la demandojn de gelernantoj en Esperanton kaj la respondojn en germanan. Mi aldonu, ke mi ekkonis miajn amikinojn Nora kaj Palma, kiam mi estis 3-jara, do jam antaŭ 13 jaroj. De tiam ni renkontiĝadis multfoje dum infanaj kongresetoj, familiaj renkontiĝoj kaj privataj vizitoj en nia aŭ ilia hejmo.

-Veronika Pochanke-

* * *